

Nia kvaronjarcenta esperantisteco  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 737, 1977.11.23 & 25 & 26

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Estas en la monato novembro 1952-a, ke ni komencis praktiki esperanton. Ni tiam studadis en la porinstruista lernejo en Neuchâtel.

A.- 1952-1977 : Tio faras ekzakte 25 jarojn. Tiun ĉi monaton ni do ekfariĝis kvaron-jarcent-aĝaj esperantistoj. Jen persona evento, kiu rajtigas nin foje paroli pri ni mem. Kelkajn elsendojn ni dediĉos al rememoroj aŭtobiografiaj ligitaj al nia esperantisteco.

Cl.- Plurfoje dum la infaneco mian atenton altiris informoj pri esperanto, kiujn mi trovis en raportoj de Edmond Privat. Mia patrino estis fidela legantino de la kooperativa semajna organo *Coopération* kaj de la kvaker-tendenca dusemajna revueto *L'Essor*. Kronikoj de Edmond Privat aperis en ambaŭ gazetoj, kaj tiujn ĉi tekstojn mi ŝatis legi ekde mia 12-a jaro pro ilia simpleco kaj ĉar ili malfermis al mi vastajn horizontojn : ili raportis pri la luktoj de aziaj kaj afrikaj popoloj emaj al sendependiĝo kaj pri la neperfortemo de Mahatmo Gandhi, de liaj disĉiploj Danilo Dolci en Sicilio kaj Martin Luther King en Usono. Pri la sviso Pierre Ceresole kaj la laboro de Internacia Civila Help-servo, mi ankaŭ legis kun intereso.

A.- Persone mi konatiĝis kun Edmond Privat tra la kanalo de liaj politikaj kronikoj aperantaj en la socialista tagĵurnalo *La Sentinelle*.

Cl.- Ankaŭ ĉirkaŭ la dektria jaro mi ekŝatis legi biografiojn tra la kanalo de la verketoj de la edukistino Alice Descoeurdes. Pere de la libro *Vie héroïques (Heroaj vivoj)* mi intimiĝis kun la neordinara vivo de Zamenhof. Ekde tiam la strang-kapa kalvulo ne plu estis fremda al mi.

A.- Oni neniam subtaksos la influon de la legaĵoj dum la infaneco.

Cl.- Sed kiam mi fariĝis 16-jara, mi maltrafis unikan okazon eklerni esperanton. Dum unu jaro mi restadis en la neordinara lernejo *Ecole d'Humanité*, kiu ĵus instaliĝis en la oberlanda vilaĝo Goldern. Ĝia direktoro Paulus Geheeb forlasis la hitleran Germanion jam en 1936 kaj rifuĝis kun sia lernejo en Svislando. Ĉiu lernanto mem elektis sian studplanon, kaj la instruisto Gerard Cool proponis esperanto-kurson. Kvankam mi tre ŝatis lin kiel matematik-instruiston, mi neglektis lian alian fakon. Mi verŝajne sentis la bezonon min plene dediĉi al la gimnaziaj studoj pere de intensa studado de la germana kaj angla.

A.- Sed en la lernejo *Ecole d'Humanité* pedagogoj el multaj landoj venis viziti Paulus Geheeb. Kelkaj parolis esperanton kaj Gerard Cool interpretis germanen iliajn paroladojn.

Cl.- Mi konvinkiĝis, ke esperanto estas ne nur belsona, sed ankaŭ utila. Tuj post la forlaso de la lernejo mi pli kaj pli sentis la emon ĝin foje lerni.

A.- Sed tiam estis la gimnaziaj studjaroj.

Cl.- Ekde mia 19-a jaro mi komencis dediĉi miajn somerajn feriojn al helplaboro en la kadro de Internacia Civila Help-servo. En la valezaj vilaĝoj Erschmatt kaj Chandolin mi partoprenis la konstruadon de fromaĝejo kaj de alpa vojo. Pli kaj pli mi sentis la mankon de interlingvo.

Nur per gestoj ni povis paroli al tiuj, kiuj ne sciis la francan, germanan kaj anglan. Kaj ambaŭ lastajn mi fuŝpraktikis.

A.- Alvenis la tempo de la porinstruista studperiodo. Tiam mi renkontis mian estontan edzon.

Cl.- Iun matenon okaze de tre teda metodologia kurso pri la instruado de la franca lingvo, kamaradino, kies patro estis instruisto, esprimis neordinaran vidpunkton. Ŝi diris, ke ŝia patro opiniis vana la instruadon de la germana en la lernejo. Post kvar jaroj la gelernantoj eliras la lernejon sen povi sin esprimi en tiu ĉi fremda lingvo. Ŝia patro estis favora al la enkonduko de esperanto kiel unua fremda lingvo.

A.- Ni ne memoras plu kial tiu ĉi temo estis tuŝita. Sed ni ĉiam vidas la vigan reagon de la instruisto Louis Roulet, hodiaŭ profesoro en la Universitato Neuchâtel. Li asertis, ke esperanton oni ne povas paroli, ĉar ĝi estas artefarita. Kaj li mokis pri la adeptoj de tiu ĉi lingvo sen literaturo kaj sen animo.

Cl.- Por mi la afero estis decidita. Mi volis scii, kiu pravas : ĉu la instruisto asertinta, ke tiu lingvo estas nepraktikebla, ĉu mia memoro pri la vivanteco de la esperanto-prelegoj en la lernejo l'Ecole d'Humanité. Mi konis civiliston, kiu estis esperantisto. La saman vesperon mi telefone rendevuis kun li kaj la postan sabaton mi ekdeĉifris kun lia helpo la romanon *La longa vojo* de Meye, lernante kiel konsulti vortaron kaj ŝlosilon.

A.- Pri tio ni rakontos venontan semajnon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !